V-0891/1


# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 1. No. 1 OKTOBRO 1948


## 30 JAROJ DE ĈSR.

La historio de la naskiĝo de memstara ĉehoslovaka ŝtato, estos eterne kunfandita kun la nomoj de Prezidento-Liberiginto T. G. Masaryk kaj kun lia kunlaborinto, dua respublika prezidento Dro E. Beneš. Masaryk, kiel la unusola tiama ĉeha politikisto, sciis en la jaro 1914 ĝuste diveni la veran politikan situacion. Vidinte la grandan ŝancon, reakiri la perditan liberecon de sia nacio, foriris eksterlanden, por prepari la rezistan, liberigan movadon.

Interne de la habsburga monarkio Aŭstro-Hungara malfermis la subteran movadon ĉehaj politikistoj, anoj de la organizaĵo „Maffio"; inter ili Kramář, Soukup, Rašín, Stříbrný kaj aliaj. La ĉefan rolon en tiama subtera movado ludis grandparte burĝa klaso, de kiu estis la tuta movado ankaŭ influita; ĝi havis burĝan karakteron. Sed baldaŭ montriĝis, ke la militintaj grandpotencoj ne havis ian fortan deziron disbati la habsburgan monarkion, precipe tion nedeziris imperiestra Rusujo. Oni sciis ja, ke en Aŭstro-Hungara monarkio vivas multe da nacioj, kiuj sopiras sian memstarecon, kaj tion la grandpotencoj vidis komplikaĵoj malutilaj al ilia grandpotenca politiko.

Sed la granda venkinta rusa revolucio en la jaro 1917 tute ŝanĝis la situacion. De tie la unuanfojon dum la tuta milito, aŭdis malgrandaj nacioj, la voĉon de libereco ankaŭ por malgrandaj nacioj de la habsburga monarkio. Tiu ĉi rusa revolucia deklaro pri libereco de malgrandaj nacioj, igis poste ankaŭ la amerikan prezidenton Wilson, ke li en liajn 14 artikolojn de la kapitulacio-kondiĉoj, metis la postulaĵon, ke malgrandaj nacioj de Aŭstro-Hungara monarkio rajtas postuli la sindestinon. La plej-kompetenta kaj decida organo fariĝis en la hejma rezista movado la Nacia komitato, kiu estis fondita en julio 1918. Ĝiaj anoj estis reprezentantoj de ĉiuj ĉeĥaj politikaj partioj. Krom tio Socialdemokratia kaj Naci-socialista partioj fondis en septembro 1918 Socialistan konsilantaron. Sed kiom multe estis tiu ĉi laborista movado dependa de la burĝa Nacia komitato, kiu posedis ĉiujn gravajn poziciojn de la rezista movado, tion oni plej-multe povis prijuĝi dum la ĝenerala striko de laboruloj la 14an de oktobro 1918, kiu ekflamis en la momento, kiam aŭstriaj oficoj volis fortransporti ĉiun grenon el la jam malsatantaj ĉeĥaj landoj. La Socialista konsilantaro eldonis instrukciojn, laŭ kiuj estis proklamota memstara ĉeĥoslovaka respubliko, kaj fakte tio ankaŭ en multaj kamparistaj komunumoj okazis.

Jen ni prezentas al vi la tekston de tiam publikigita proklamaĵo, adresita al la tuta popolo de la ĉeĥa nacio:

„Proklamaĵo
de ĉiu popolo
en la ĉeĥoslovaka nacio.

Ni unuanime aprobas la decidon de la ĉeĥoslovaka Socialista konsilantaro.

Ni centmiloj da ĉeĥa popolo en ĉiuj ĉeĥaj regionoj, hodiaŭ solene protestas kontraŭ la eksportado de nutraĵoj kaj karbo, kontraŭ la dezertigado de nia lando, kontraŭ la murdado de nia nacio.

Kvar teruraj jaroj de la suferado superiĝis. La sennombraj tomboj de niaj plejkaraj, la popolo fariĝinta skeletoj kaj muta teruro de niaj familioj, igas nin defendi sin. — Ni finis la traktadon kun tiuj, kiuj estis al ni entruditaj de fremda registara potenco. Estus malestime por la tuta nacio plue trakti kun faktoroj nesentantaj la respondenon pri sia nacio, ĉar per unu mano ili konstante promesadis kaj per la alia ili konstante rabadis.

La tempo maturiĝis. Ni forĵetis la katenojn de sklavigitaj servutuloj. Ni deklaras nian memstarecon. Kun nerompebla propra volo kaj kun konsento de la tuta demokratia mondo ni proklamas, ke ni staras ĉi tie hodiaŭ kiel la plenumantoj de nova ŝtata suvereneco, kiel civitanoj de

libera Ĉeĥoslovaka respubliko.

Ni proklamas, ke ĉiu provo fortransporti nutraĵojn kaj vandali nian landon, estas la sama rabado, la sama krimo kontraŭ la suvereneco de nia ŝtato, kia estis la rabo-atako komence de la milito, farita kontraŭ Belgio. Ĉiu simila provo, igos la vastajn tavolojn de ĉeĥa popolo frenezenergie defendi sin. En tiu ĉi komuna defendo kontraŭ la malsato kaj morto, estos solidarecaj kun ni ankaŭ la vastaj tavoloj de germana laboranta popolo. Kiu kontraŭstaros ĉi tiun volon de la popolo, tiu fariĝos juĝoto de la popola registaro. Ĉiu nova perforto, farota kontraŭ ni, fariĝos nova nia akuzo prezentota al la internacia tribunalo. La rajton je nia vivo, je nia libereco, prenos al ni hodiaŭ jam neniu. Nia afero estas afero de la tuta mondo. Tiu afero jam glore venkis kaj ho ve al tiuj, kiuj kuraĝus bari la renaskiĝintan nacion en ĝia glora marŝo al nova estonteco. La proklamo de libera respubliko ĉeĥoslovaka estos publikigita hodiaŭ lunde la 14-an de oktobro 1918 je la 10.30 horo antaŭtagmeze sur la malnovurba placo".

La konservativa Nacia komitato rifuzis ĉi tiun revolucian agon de la laboristaro, ĉar kaj enlandaj kaj eksterlandaj reakciaj rondoj vidis en tiu ĉi ago de la ĉeĥa laboristaro, unuiĝinta en Socialista konsilantaro, la influon de proletara rusa revolucio. Ankaŭ la imperiista korto en Vieno timis pro la bolŝevika danĝero kaj ĉesis kun la persekutado de ĉeĥaj politikistoj, kiam oni konvinkiĝis, ke la ĉeĥa rezista movado neniel minacas la privatkapitalistajn interesojn. Ke la registaraj rondoj en Vieno tolereme juĝis la situacion de la Nacia komitato, tion pruvas la fakto, ke ili volonte donis la pasportojn al reprezentantoj de Nacia komitato Kramář, Klofáč, al la bankdirektoro Preiss kaj aliaj. Ili povis vojaĝi en Ĝenevon, kie ili esperis kunveni kun la reprezentanto de nia eksterlanda registaro Dro Edvard Beneš. Intertempe monarkio Aŭstrio-Hungario estis trafita per ruiniĝo de la armeo, kiu disfalis. Sed la anoj de la Nacia komitato atendis, ĝis ili ricevos oficialan raporton pri tio, ke Aŭstria regno kapitulacis. Oni sciis, ke la komuniko de austria ĉefministro Andrassy pri la kapitulacio de Aŭstro-Hungara malamita regno, devas ĉiumomente fariĝi publika, sed la Nacia komitato la proklamaĵon pri memstara ŝtato prokrastis. Tuj kiam estis konate, ke la kapitulacio estas jam skribita, la Nacia komitato proklamis la 28an de oktobro 1918, la memstaran Ĉeĥoslovakan ŝtaton. Socialistaj tendencoj de la konsilantaro estis repuŝitaj pro ĝojo reganta la stratojn, kie ludis muzikoj, kie oni dancis. Ĉie estis hisitaj naciaj flagoj, la emblemoj de Aŭstria monarkio estis ĉie forigitaj. Homoj kisis sin reciproke sur la stratoj, ĉie oni kantis, dancis kaj muzikis. *Socialistoj perdis sian bonan okazon, krei ŝtaton socialistan.* Sekvis tagoj, en kiuj la burĝa klaso komencis plifortigadi sian pozicion; la unua parlamento ne estis elektita, sed komisiita laŭ la rezultoj de la elekto el jaro 1911-a, por la burĝa klaso tre favora. La unua baza postulaĵo estis la terposeda reformo, kiu estis efektivita nur parte, kvankam la perfektan efektivigon multe subtenadis la respublika prezidento Masaryk.

La pliposta elekto de parlamento, donis efikan plimulton al socialistaj partioj. Sed baldaŭ oni konvinkiĝis, ke estis unu pozicio post la alia lasita al la kapitalista klaso.

Sekvis, ke ĉefministro Tusar volonte cedis la ministeriajn seĝojn al burĝa oficista registaro. Nature la malkontenteco en la vastaj tavoloj de la laboristaro kreskis, oni ne konsentis kun tia socialista politiko, farita je bono de kapitalistoj. Tial okazis, ke la parto de malkontentaj socialistoj, kiuj la programon de Marx sekvis fidele kaj precize, fondis en januaro 1921 partion revolucian, al kiu ili donis nomon Komunista partio de Ĉeĥoslovakio.

Kvankam la terposeda reformo farita de la unua respubliko en la jaro 1919 estis ago revolucia, tamen el la kvanto de 4 milionoj da konfiskota nobelara grundo, (tio estis pli ol unu kvarono da grundo de la tuta respubliko), restis 1 miliono hektaroj da grundo en manoj privatkapitalistaj. Tiel elkreskis 2000 novaj grandbienoj kun 100 hektaroj da grundo, sed etkampistoj ricevis sume nur 640.000 ha da grundo.


Nia ekonomia politiko, ligita per miloj da fadenoj kun la tutmonda ekonomio, ne povis esti netuŝita per la granda krizo, kiu tiam trafis la tutan kapitalistan mondon. En butikoj estis plenaj stokoj da varo, kiu restis nevendita, ĉar mankis la mono inter la laboranta popolo. Fabrikoj ĉesis produkti, oni maldungis la laboristaron. La nombro de maldungitoj de tago al tago kreskis kaj en la jaro 1930 estis jam 1 miliono da senlaboruloj; el ili 200 mil junaj homoj. Tiama familio de maldungito ricevis 20 kronojn semajne kiel almozon. Poste oni formis el la maldungitoj, tiel nomatajn „Standardojn de laboro", kie la laboristoj kaj oficistoj ricevis 35 kronojn semajne.

Ili ĉiuj vivis nur sur la sistemo de almozo, aŭ plifeliĉaj parencoj zorgis pri la senokupitaj, ke ili ne mortu pro malsato. Estroj de grandaj entreprenoj, komercaj domoj kaj oficejoj devigis labori la junan dungitaron por ridinde malgranda rekompenco, proksimume 200 kronojn monate. Tiel okazis, ke junaj vendistinoj, kudristinoj, laboristinoj kaj skribistinoj el oficejoj devis prizorgadi la bezonan vivrimedojn ofte per laboro de publikulinoj. En tia sfero kreskis bona ŝanco por faŝismo, kiu ensidiĝis ankaŭ en nia lando, kulpe de malbona socialista politiko kaj de tiama reĝimo kontraŭpopola. En la jaro 1936 ĉeĥa politikisto Klement Gottwald dum la tutŝtata konferenco de Komunista partio ĉeĥoslovaka diris: „Se ni lasos liberan kampon de propagando al la reakcio, do ĝi vendos nin en nia haŭto al Hitler." Nur komunistoj sciis, kia danĝero minacas la nesocialistan, burĝan respublikon.

Ceteraj politikaj partioj nenion faris kontraŭ la subfosa laboro de reakcio, kaj sekvis tio, kion Gottwald profetis: Munĥeno kaj poste okupacio de Bohemio kaj Moravio. Slovakio fariĝis satelita ŝtato de Hitler. Ankaŭ tion kulpis la ĉeĥa reakcio, kiu naskis ideon: „Ĉeĥoslovaka nacio", kvankam devis esti rekonite laŭ la Konstitucio, ke ekzistas du samrajtaj nacioj: la ĉeĥa kaj slovaka. Tiu ĉi malbona politiko kaŭzis, ke multaj Slovakoj malamis Ĉeĥojn. Kulpa estis nur la ĉeĥa reakcio, kiu pri Slovakoj parolis malestime. Nun estas alie. La nova Konstitucio forigis ĉi tiun diferencon. Slovakoj kaj Ĉeĥoj man en mane, kiel samrajtaj nacioj, konstruas ŝtaton, *kiu fariĝos ŝtato socialista.* Adam

---

● Marde la 12an de oktobro okazis kunsido de ĉs. registaro, kiun prezidis la ĉefministro Antonín Zápotocký. Ministro por informoj Václav Kopecký prezentis al la registaro sian raporton pri la okazontaj celebroj okaze de la 30 jara jubileo de Ĉeĥoslovaka respubliko. La festenojn prizorgos en la tuta respubliko la ago-komitatoj. En Praha krom tio Nacia parlamento en sia kromkunveno aprobos la projekton de kvinjara plano, subskribota samtempe de la respublika prezidento Klement Gottwald.



*Prezidanto de ĉs. registaro Antonín Zápotocký.*

## KONFERENCO DE ROH EN PRAHA
(REVOLUCIA-SINDIK-MOVADO).

La 9 an kaj 10 an de oktobro okazis en Praha la tutŝtata nacia-ekonomia konferenco de ROH (ĉs. sindikata movado). En la granda halo de Radiopalaco malfermis la konferencon la prezidanto de la nacio-ekonomia komisiono inĝ. M. Reiman, kiu en sia alparolo akcentis la signifon de la konferenco, okazanta interlime de kaj dujara kaj kvinjara planoj de la rekonstruo de ĈSR. Ankaŭ la ĉeesto de multaj registaranoj donis al la konferenco de ĉs. sindikistoj solenan aspekton. Ĉeestis krom multaj ekonomiaj fakuloj ankau la ĝenerala sekretario de la ekonomia konsilantaro dro. inĝ. E. Outrata kaj la prezidanto de nacia-ekonomia departemento ĉe respublikprezidenta oficejo inĝ. L. Frejka. La prezidanto de ROH, ĉefministro Antonín Zápotocký analizis en sia alparolo nian ekonomian situacion kaj tuj komence li kritikis kelkajn malavantaĝojn sur tiu ĉi kampo, akcentinte, ke ili devas esti forigitaj ankoraŭ antaŭ la komenco de la kvinjara plano. Li diris: Sindikataj organizacioj devas ŝanĝi sian ĝisnunan laborsistemon. Estas necese ne nur organizi la sindikalismon, sed zorgi ankaŭ pri la organizado de la produktado, administrado, edukado, reformi agrikulturan progreson kaj la distribuadon entute Nia sindikata movado devas dediĉi multe da atento al la plenumado de dujara kaj kvinjara planoj, ĉar ili estas la baza ŝtono de la pliboniĝo de vivnivelo en la vico de la laboranta popolo. Ni devas konfesi, ni kamaradoj, direktoroj de la naciigita industrio, teknikistoj, administrantoj, laboristoj, funkciuloj de sindikalismo kaj ni de la entrepreno-komitatoj, ke ni ne sufiĉe bone eluzis ĉiujn eblecojn, kiujn donis al ni la naciigita produktado. Ne okazis pro manko da bona volo, sed pro tio, ke ni ankoraŭ nedemetis nian kutimon vidi nian laboron nur el la vidpunkto kapitalista, ke ni ne ŝanĝis ofte la sistemon de la labororganizado, kiu ordonas vidi la celon de la produktado, kiu devas esti racie direktata. Tro multe de heredaĵoj de la malnova kapitalista sistemo restis ankoraŭ sur niaj dorsoj kaj restis al ni ankoraŭ multe da antikvaĵaj opinioj pri la signifo de la laboro, produktado kaj distribuado. Ne sufiĉas pri la laboro nur paroli, ĝi devas esti plenumata. Ni devas serĉi en niaj laborsektoroj ĉiun kialon de la malsukcesoj kaj demandi, ĉu la respondaj ĝeneralaj direktoroj scias pri tio. Jes ni havas fakte grandajn sukcesojn, sed ni havas ankaŭ vunditajn lokojn sur la trunko de nia ekonomia konstruado. Ni demandas: Kion faras loko Neratovice, kial ilia elektromaŝina premilego ne ankoraŭ funkcias? Ĉu scias pri tiuj ĉi vundoj la ĝenerala direkcio? Kiam estis la ĝenerala direktoro aŭ la vicdirektoroj rekte sur la malsukcesaj laborejoj, por surloke konvinkiĝi kiel oni laboras? Kion ili faris por plibonigi la staton? Tio ĉi ne estas parolo kontraŭ la ĝeneralaj direkcioj. Ni bezonas ilin, sed ne por reprezentado. Ni bezonas ilin, ke ili administru la produktadon, ke ili konu la malavantaĝojn, ke ili bonvalorigu la akiritajn sukcesojn kaj la bonajn ekzemplojn, ke ili metu senton por la laboro sur lokojn kie troviĝas neemo labori bone kaj sukcese. Plue ni demandas, kial ankoraŭ ne funkcias la fabriko je penicilino en Roztoky? Sufiĉas nomi nur kelkajn tiajn vundojn de nia naciigita produktado en diversaj sektoroj, kaj ni tuj vidas neprecizan diagramon, kiu kontraŭas laĝ is nun akiritajn sukcesojn. Jes, la kresko de la laborefiko kompare kun la jaroj post la unua mondmilito estas laŭdinda, ĉar granda, sed tio ne emu nin dormi nun sur la florkronoj de la gloro.

Se ni haltiĝus, ni baldaŭ irus reen. Ni devus nomi nin blindaj, se ni volus ne vidi, ke la produktado dum la lasta tempo iom malaltiĝas, ja kelkie ankaŭ haltiĝas. De la monato julio 1947 kreskas la laborenspezoj plirapide, ol la produktiveco de la laboro. Nu, tio estas stato danĝera, se tiu ĉi diagramo ne ŝanĝiĝus, ni eĉ ne povus garantii la plibonigadon de la vivnivelo.

Poste la ĉefministro citis la vortojn de J. V. Stalin, ke oni devas direkti la entreprenojn ne ĝenerale, sed konkrete. Pri tio devas zorgi ankaŭ ni sindikistoj. Mi opinias-diris la ĉefministro-ke en la vicoj de ŝtataj kaj

publikaj dungitoj oni tute forgesis, ke la realigo de nova salajroleĝo estas ebla nur kiam estos ekonomigitaj la taskoj en tiu ĉi sektoro, ĉar en tia formo, kia estas nun, la publika kaj ŝtata administrado estas nekompareble superŝarĝita per laboroj neproduktivaj, kio multe bremzas la ŝtatan ekonomian administradon. Ne estas eble eterne interesiĝi nur pri alpagoj kaj pri renomiga avansado; pri diversaj funkcio-alpagoj, sed oni devos unuavice garantii la pligrandan laborefikon kaj ĝian produktivecon en vicoj de kaj publikaj kaj ŝtataj dungitoj. Ni devos forlasi multajn malnovaĵojn de nia klaspolitiko kaj nian intereson dediĉi al junaj adeptoj de la laboro.

Fine de la monato julio la sociologia sektoro por la esplorado de la laboro publikigis statistikon el kiu oni povis konstati, ke 63% de la knabinoj el burĝaj lernejoj preferis esti okupitaj en kancelarioj. Sekve ni devas demandi kiajn ni ankoraŭ havas la instruistojn en niaj lernejoj? Tiel longe ni ne povos dissolvi la problemon, kiel longe iliaj disĉiploj ne respektos la laboron, la laborsignitajn manojn de laborantaj laboristinoj, kiujn ili malestimas. Ni dissolvos tiamaniere nek la problemon de instruistoj nek ĉian alian.

Do ankaŭ tiu ĉi problemo devas interesigi la sindikistajn organizaciojn. Tio signifas, ke ni devas eduki niajn instruistojn ke ili laboru produktive. Ankaŭ la Asocio de la junularo devas forigi tion, kion la milito kaj lernejoj fuŝis sur la animoj de la junularo.

La agrikultura produktado kaj ĝia universala prospereco estas la plejmalkontentiga sektoro de nia dujara plano. Urĝas mekanikigi la laboron de niaj kampistoj, doni al ili maŝinojn kaj energie reorganizi. Nur tiam la kampistoj povas plenumi sian taskon zorgi pri la nutrado de la loĝantaro. Tio signifas, ke oni devas forigi kaj kontraŭstari la multiĝadon de privatkapitalistaj, egoistaj elementoj ne nur sur tiu ĉi kampo, sed ankau en la industria sektoro. Unuavice temas pri la ŝtataj grandbienoj. Niaj sindikistoj agronomoj, niaj kampistoj, laboristoj kaj laboristinoj devas konkrete, ne ĝenerale, solvi la demandon de la produktiveco de ilia laboroj sur iliaj grandbienoj. Ili devas komenci la konkursadon kun aliaj grandbienoj. Ankaŭ al la sektoro de distribuado oni devas dediĉi pli da intereso, ĉar tie estas versimile multe da laborrezervoj, kiuj ne estas plene eluzitaj por la produktiveco de la laboro. Antaŭ la milito dum la privatkapitalista reĝimo bankrotis regule pli ol 16.000 komercistoj ĉiujare. Nun ni havas pli ol 150.000 komercistaj entreprenoj. Ĝenerale ili asertas, ke estas nenio por vendadi, sed pri la bankroto oni nenion aŭdas. Restas do demando: el kiaj rimedoj la komercistoj vivas? La ĉefministro Zápotocký poste diris, ke estos necese plidetale kontroli la akaparistajn parazitojn, kiujn ni ne tute sciis nuligi. Eble trovos iu miajn vortojn tro kritikajn kaj pesimismaj. Tute ne, miaj kamadaroj! En la tagoj de la plejkriza situacio de nia sindikata movado mi ne ĉesis kredi, ke ni fine venkos. Sed mi scias, ke nian venkon plejmulte difektas la grandbuŝuloj, kiuj ebriiĝas per venko, per sukcesoj, kaj emas kredi, ke plenumi la donitajn taskojn estas amuzaĵo kaj ili preskaŭ rifuzas ĉiun kritikon kaj memkritikon. Ni batalas por plena venko de nia longjara laboro, ni troviĝas sur fronto de la laboro, kaj tial ni devas mobilizi ĉiujn fortojn por defendi ĉi tiun vivosignifan laboron, kiu garantios plibonan estontecon de nia popolo.

Ni scias, ke nia klasa malamiko per sabotado de nia laboro nutras ĉe ni elementojn de malkonstruado kaj paniko, ankaŭ multaj niaj civitanoj volonte helpos al ili disvastigadi tiun panikon, sed mi diras al vi, *ke ni venkos plene kaj glore, ke nia kvinjara plano sukcesos* — finis la ĉefministro, prezidanto de ĉs. sindikata movado Antonín Zápotocký, sian alparolon al la kongresintaj sindikoj en Praha. am

---

ESPERANTISTOJ-JURNALISTOJ BONVOLU LEGI!

La redakcio de „Esperanto-Servo“ sendos al Vi ĉiun kvanton de nia organo, se vi skribos al „Esperanto-Servo“, Praha II., Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio. Ni estos al Vi dankemaj, se Vi uzos kelkajn artikolojn en vialanda preso kaj post la represo sendos unu ekzempleron al ni. Neforgesu ĉiam akcenti la fonton de la raporto t. e. „*Esperanto-Servo,* Praha“, por kio ni jam antaŭe dankas.

**Kara samidean-in-o! Post la tralego de „Esperanto-Servo“ bonvolu detranĉi la kuponon, aldonu Vian adreson kaj de tempo al tempo bonvolu ĝin sendi al nia adreso: „Esperanto-Servo“, redakcio, Praha II., Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio.**

Kiu sendos al ni ĉiujn kuponojn, tiu ricevos de ni belan ilustritan libron pri Ĉeĥoslovakio. Do kolektu la kuponojn kaj sendu ilin al nia redakcio. Koran dankon.

Mi ricevis la informan bultenon „Esperanto-Servo“ Nro 1.

Kaj mi estas
a) kontenta,
b) malkontenta,
c) mi proponas

.............................................................

.............................................................

Mia adreso:
(preslitere)

*) La kuponon sendu al ni nur eksterlandaj gesamideanoj.

## ESPERANTISTÉ VE SLUŽBĚ NÁRODA

Esperantisté!

Dnes dostáváte do rukou první číslo „Esperanto-Servo“, které je určeno pro informaci Vašich zahraničních přátel. Opírajíce se o Vaše poctivé vlastenecké smýšlení, žádáme Vás o spolupráci.

Nepodceňujeme nikterak drobnou práci všech esperantistů dobré vůle a věříme, že každý z Vás na svém místě při písemném styku s cizinou může vykonat kus dobré práce pro pracující lid Československa, když do svých dopisů, určených přátelům v zahraničí, vloží vždy tento list, aby pokud možno nejrychleji přišlo „Esperanto-Servo“ do rukou zahraničních esperantistů. Kdo tak učiní, vykoná kus záslužné práce, neboť zahraniční tisk ne vždy objektivně informuje o poměrech v Československu. Doba na nás vyžaduje, abychom znalost esperanta vložili plně do služeb národa a pomáhali tak tlumit nepřátelskou propagandu v cizině.

Na štěstí máme v zahraničí dosti přátel, a to jak ve Skandinavii tak i na západě, jež nesmíme ponechati jen vlivu nepřátelské propagandy. Je naší vlasteneckou povinností pravidelně informovat naše známé o tom, co se u nás děje, jak náš lid v práci a přičinění buduje lepší zítřek navzdory domácí i vnější reakci. Musíme dokázat na oficiálních místech našeho veřejného života, že jsme platnou složkou v budování nového Československa, že i esperantisté mohou značně přispěti k upevnění jeho mezinárodního postavení a přátelství s jinými národy, k propagaci čs. zboží v cizině a k získávání zahraničních trhů. Proto nově ustavená sekce Svazu esperantistů ČSR, „Instituto de Esperanto-Servo“, Ústav esperantské služby, Praha II, Malá Štěpánská 7, telefon 330-14, si vzala za úkol podávati cizincům čisté víno pravdy, bez nadsazování a propagandy, nýbrž publikováním skutečností, které mluví o vykonané práci pro lidově demokratické Československo, a to jak na poli politickém, sociálním, hospodářském, kulturním a osvětovém, tak i ve hnutí odborovém. Tento náš úkol se zajisté podaří za Vaší spolupráce, k níž máme všechny ideové i materiální předpoklady, opírajíce se o činorodou práci všech opravdových vlastenců-esperantistů. Budeme pečovati o prohloubení vnitřní práce ve Svazu esperantistů zřizováním osvětových seminářů, které budou zahájeny ve dnech 15.—18. prosince t. r. v Praze.

Všechna předsednictva odboček Svazu, všechny krajské a okresní delegáty, všechny odbočky a kluby, esperantisty oddané vlasti, zveme ke spolupráci na národa roli dědičné a věříme, že se nám dílo podaří. Na závěr bychom chtěli připomenout ještě slova básníka.

S. K. Neuman

NEZRAZUJ

jen o tebe mi, lide, běží, lide můj,
jen o tebe nám běží,
nezrazuj,
na domovině šero leží,
zradíš-li světla věčný přívod,
zradil jsi sebe, děti, život,
nezrazuj.

šero je pouhá hříčka času, lide můj,
šero je episoda,
nezrazuj,
trvá zdroj světla, vzduch i voda,
osení klíčí, sklizeň bude,
máj v milionech srdcí bude,
nezrazuj.

(Sbírka básní Bezedný rok)

## KARA SAMIDEAN-IN-O!

Almetite mi sendas al Vi la unuan ekzempleron de „Esperanto-Servo“, kiun mi sendados al Vi ĉiumonate por havigi al Vi informojn pri la aktuala vivo en Ĉeĥoslovakio. Nia „Esperanto-Servo“, kiel Vi mem povas konvinkiĝi estas tiu informilo, kiu ĝis nun mankis al Vi. Certe Vi kelkfoje partoprenis debatojn, kiam oni priparolis diversajn okazintaĵojn en Ĉeĥoslovakio. Sed certe Vi ofte konstatis, ke mankas al Vi dum tiaj debatoj fidinda materialo pri la vivo en Ĉeĥoslovakio. Tial nia instituto de E.-S. fondis specialan informan bultenon „Esperanto-Servo“, per kiu mi ĉiumonate informos Vin pri la plejaktualaj okazintaĵoj en Ĉeĥoslovakio.

Mi petas Vin akceptu nian bultenon „Esperanto-Servo“, kiel leteron de sinceraj vortoj. Mi ĝojus, se nia „Esperanto-Servo“ fariĝus Via konstanta enpoŝa kamarado, servanta al Via ĝusta informo pri lando situanta en la koro de Eŭropo, pri nova, popoldemokratia Ĉeĥoslovakio. Mi esperas, ke Vi baldau skribos al mi, kiel Vi estas kun nia „Esperanto-Servo“ kontenta. Mi estas konvinkita, ke Vi fariĝos regula leganto de nia „Esperanto-Servo“, ke post la tralego de ĝia enhavo Vi informos ankau Viajn amikojn neesperantistojn pri la vivo en Ĉeĥoslovakio, ke Vi tradukos kelkajn artikolojn Vialingve kaj donos ilin dispone al Via gazetaro. Por tiu ĉi samideana servo mi kore al Vi dankas kaj esperas, ke ni estos ambaŭflanke kontentaj.

Kore Vin salutas

Via samideane

En ............ la ............ 1948

.............................................................
(Podpis odesilatele.)

---



*Samideanoj Mařík kaj Malík ĉe mikrofono de Radio Praha.*

## VERDA STACIO

Radiostacio Praha elsendas dufoje ĉiutage en Esperanto:

Elsendo I.
16.30 de MET per mallonga ondo 31.41 metroj 9.550 kc samtempe sur longa ondo 1935 metroj 155 kc 10 kW.

Elsendo II.
22.— de MET per mallonga ondo 49.92 metroj 6.010 kc 30 kW (per 30 kW laboras ambaŭ mallongaj ondoj). Ni petas bonvolu noti la ondolongojn en Via poŝkalendario kaj donu informojn pri la elsendo de Praha aj Viaj amikoj kaj loka preso. Sendu al ni fotografaĵojn kiel Vi aŭskultas nin. Ni ilin de tempo al tempo bublikigos.

Tiu ĉi horaro estas valida de la 10-a de Oktobro 1948. Krom tio Radio Praha elsendas dufoje ĉiusemajne t. e. lundo kaj Jaŭdo:

Praha I.
22.50 de MET per meza ondo 470.2 metroj 638 kc 120 kW (sendilo Liblice).

TRIDEKMINUTA PROGRAMO DE VERDA STACIO ESTAS ĈIAM EN LA UNUA LUNDO DE LA MONATO:

Praha II.
23.— de MET per meza ondo 269.5 m 1113 kc 60 kW (sendilo Mělník).

Brno I.
23.— de MET per meza ondo 325.4 m 922 kc 100 kW (sendilo Morava).

České Budějovice.
23.— de MET meza ondo 219.6 m 1366 kc 5 kW (Sudbohemia sendilo).

Ostrava.
23.— de MET per meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

Krom tio tiu ĉi stacio elsendas dufoje semajne:

Ostrava.
Mardo kaj Ĵaŭdo:*)
23.— de MET per meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

Programo de ĉiutaga elsendo el Praha II (sendilo Mělník) estas jena:

LUNDO:
I. elsendo. Raportoj, vivo de junularo, studentoj.
II. elsendo. Raportoj, komentario pri sporto.

MARDO:
I. elsendo. Raportoj, pri Sindikata movado de ĈSR.
II. elsendo. Raportoj, Politika komentario.

MERKREDO:
I. elsendo. Raportoj, Kultura komentario.
II. elsendo. Raportoj, ricevitaj leteroj.

ĴAŬDO:
I. elsendo. Raportoj, Pri ekonomio.
II. elsendo. Raportoj, Esperantista ĵaŭda babilado.

VENDREDO:
I. elsendo. Raportoj, „Venu Ĉeĥoslovakion!“
II. elsendo. Raportoj, Pri ĉeĥoslovaka virino ktp.

SABATO:
I. elsendo. Raportoj, Pri ĉeĥoslovaka industrio.
II. elsendo. Raportoj, Aktuala komentario.

DIMANĈO:
I. elsendo. Raportoj, Internacia revuo.
II. elsendo. Radiomuntaĵo varia (muziko, literaturo ktp.)

Viajn dezirojn, kritikojn k proponojn sendu al Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-Servo, Praha XII, Stalinova 12.

*) Escepte unua mardo en la monato.

---

● Ĉs. ministerio de sociala zorgo preparas planon laŭ kiu estos eble dungi grandan nombron da knabinoj en sektoro de delikata industrio aŭ en aliaj branĉoj de la laboro, kie ne estas bezona korpa forto. Poste oni translokigos fortajn virojn en alian okupon, kie estas korpa forto bezona. La knabinoj povos post difinita tempo de la instruado, fariĝi majstrinoj de ilia metio. Oni esperas, ke tiu ĉi aranĝo ebligos pliracian eluzon de la laborpovo precipe en sektoroj, ne tro favore elektataj, kiel ekz, industrio ferfandeja, vitra, teksa, konstrua k. t. p.

● En urbo Stará Kouřím laboras 50 membra arkeologia ekspedicio, kiu sur spaco de 40 hektaroj trovis praepokan kastelon el la luzacia kulturo 1300 kaj 900 jaroj antaŭ Kristo. Plue estis trovita sidejo de Galloj, vivintaj tie ĉi eble 400 jaroj antau Kristo. Ĉis la 9a kaj deka jarcentoj post Kristo okupis la kastelon Slavoj, kiuj fondis ĉi tie nobelaran genton de Zlice. Estis trovitaj multaj potoj kaj vazoj el argilo, ŝtono kaj bronzo kaj multaj laboriloj el fero. Ĉio trovita devenas el kelkaj prahistoriaj epokoj.

---

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo“. Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, prezid. de IES presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo) Praha, Ĉeĥoslovakio.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL